

Enkonduke al la 20-a numero

En la lasta KF 19 mi esprimis la ĝeneralan konscion, ke la konstrufako prezentas tro vastan nociaron, kiu teme superas profesian specialiĝon de la multaj en nia teamo... Ĝuste pri tio aludis **Rémy Bouchet** en sia lasta mesaĝo: *La nuntempe traktataj temoj estas por mi preskaŭ tute fremdaj, miaj studoj estis limigitaj al mia faka temo „ŝtalkonstruktoj“*. Tamen la kolego Bouchet kontribuis, mi tre dankas al li. Li aldonis la informon: Ne ĝenas min, ke vi aperigas ankaŭ gramatikaĵojn kaj tetrminologiajn principojn.

Fabien van Mook al la afero menciis: Mi bedaŭras, ke kelkaj forumanoj ne sukcesas reagi al diskutoj. Unu eblan kaŭzon vi ne menciis: por momento oni simple lacas pri foruma laboro, aŭ por momento oni simple ne havas tempon, sed iom poste oni reaktivis... Mi konsentas pri la ĝis nun izita labormetodo de la forumo. La gramatikaj kaj aliaj fonaj informoj, kiujn vi traktas en la cirkuleroj, estas utilaj. Eble indas inventari, kiuj kunlaborantoj havas ekzemple PAG, vian Terminologian kurson (1986) k.a. Se ĉiuj havas, vi ne devas tajpi, sed sufiĉas referenci...

Fine de ĉi tiu KF mi (WE) demandas pri la studmaterialo. Ankaŭ mi demandas pri faka specialiĝo de la membroj. Mi estas informita nur pri kelkaj el vi (Fabien van Mook, Rémy Bouchet), pri la ceteraj mi povas nur konjekti, kiu segmento de nia fako estas al ili proksima.

Ankoraŭ mi aldonas, ke fine de la jaro 2009 kaj nun komence de 2010 mi estis eksterordinare okupita per kelkaj taskoj sen rilato al KF, la nuna KF do iom malfruas. Mi petas pri via pardono. WE

La sekretario de TAKE informas

La 15-an de januaro mi ricevis la informon de s-ro Edmond Ludwig: Kompreneble ni akceptas, ke vi zorgu pri JARKOLEKTO 2010 kaj mi jam antaŭdankas al vi... Kelkaj informoj:

Eble vi vidis la anoncon, kiun ni publikigis en la revuo ESPERANTO. Bedaŭrinde ĝis nun venis neniu eĥo ! Sed post kelka tempo mi startigos alian pli ampleksan kampanjon ĉe la prezidantoj de naciaj Esperanto-asocioj. Sed antaŭ ol fari ion ajn plian, mi ĉion klarigos al vi kaj ĉiuj estraranoj.

Alia informo: antaŭ du horoj mi tagmanĝis kun la dekanato de la Fakultato pri Lingvoj en Mulhouse, kiu kreis kurson tutoficialan kaj kie mi instruas. Tagmanĝis kun ni la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta kaj Cyrille Hurtsel, kiu estas respondeculo pri komunikado ĉe ESPERANTO-FRANCE kaj kiu instruas Esperanton en Konsilio pri Eŭropo en Strasburgo. Antaŭ la invito ni vizitis la dekanon de la Nacia Altlernejo pri Ĥemio, kiu estas amiko de Cyrille. Eble iom post iom venos studentoj de la sciencaj fakoj al mia kurso. Montro de JARKOLEKTO impresis! Kun plej esperantistaj salutoj! ;Edmond Ludwig

Alvoko por la Jarkolekto de TAKE 2010

Mi (WE) kredas, ke artikolon por la jarkolekto kompilos ĉiu regula kunlaboranto. Kore mi invitas ankaŭ la okazajn legantojn, parencajn profesiulojn, lige kun konstrufako kaj arĥitekturo vi povas elekti temon, kiu la legantojn klerigos fake, eventuale ankaŭ faklingve, ĉar ĝuste la leksiko de nia fako estas tereno bezonanta multe da nia atento kaj polurado.

La kontribuojn mi ŝate ricevos **antaŭ la fino de junio 2010**. Mi petas, ke vi anticipu informu min pri la temo de via artikolo, kvankam mi principe ne volas temojn limigi alie ol per la fako «konstruado» inkluzive de ĉiuj subfakoj kaj metioj. La amplekso ne estas fiksita. Por simpla temo sufiĉas unu paĝo.

Kontaktoj

Fabien van Mook esprimas kontenton, ke niaj forumaj decidoj havas ŝancon enveni la venontan version de la nova PIV. Krome li demandas: Ĉu eblas havi elektronikan eltiraĵon kun la vortoj (kaj ties artikoloj), kiuj en NPIV havas la vinjeton «konstruado/arĥitekturo/k.s.»? Super tiu listo la forumo povus diskuti kaj provadi modifojn, korektojn. WE: Mi provos ricevi la koncernen respondon de la reviziintoj.

Michel Duc Goninaz: Dankon pro la sendo de Konstru-Forumo 19, kiu enhavas tre gravajn proponojn kaj diskutojn pri fakaj terminaroj. En ĝi estas tuŝita ankaŭ la tradicia po-problemo. Mi sendas al vi ĉi-kune mian tiuteman artikolon, publikigitan en 2007, "Kiel la anĝela PO povas helpi vin por ricevi dolarojn, manĝi pomojn kaj eble ĉesigi la fumadon", La Ondo de Esperanto, n-ro 6, p.10-12. Koran saluton, M. Duc Goninaz

Profesoro Erich-Dieter Krause: Tre ŝatata kolego, permesu, ke mi diru al vi: **Via laboro por kaj per KONSTRU-FORUMO estas ege aplaŭdinda. Mi bedaŭrus, se mi ne plu ĝin ricevus.** Samideane via Erich-Dieter Krause.

D-ro Heinz Hoffmann, estro de la Terminologia Komisiono de IFEF: En Ko-Fo 19 vi informis, ke Klaŭdo Roux invitas partopreni en aktualigo de NPIV, kiu povus reeldoniĝi post tri jaroj. Mi jam notis kelkajn necesajn korektojn en mia fako. Unu el ili koncernas kaj fervojon kaj konstruon, nome la temon TALUSO. Sekve mi rekomendas pridiskuti ĝin ankaŭ en TAKE. Vidu la aldonitan dosieron. Aŭfable salutas...

D-ro Zlatko Hinšt: Mi sendas al vi novan kontribuon, samtempe respondo kaj reago al niaj ĝisnunaj diskutoj por aldon(a)o de nova Ko-Fo. Mi petas ke vi ne ignoru min kaj miajn argumentojn, faktojn, klopodojn ktp. **WE**: Mi dankas. La novan kontribuon mi almetos ekspedante KF 20.

Speciala lingvo laŭ la normo ISO 1087-1:2000 – parto 3.1.3

La ĉefa celo de KF estas serĉi kaj trakti fakajn nociojn, kiuj en Esperanto estas ankoraŭ sen nomindiko. Tamen, traktante niajn temojn, ni devas uzi kompleksan lingvon, obeante ĉiujn regulojn de la lingva sistemo, inkluzive de la reguloj vortofaraj, gramatikaj, semantikaj, sintaksaj. **Speciala lingvo**, ofte nomata ankaŭ faka lingvo, estas la tuto de ĉiuj lingvaj rimedoj, kiuj uzatas sur difinita, faka limigita komunika kampo, ĝi certigas la interkompreniĝon de homoj, kiuj agas sur tiu komunika kampo.

Mi do petas vian konsciemon, se mi laŭbezone atentigas pri la aferoj lingvaj, kiujn vi eble taksas kiel marĝenajn, sen rilato al la celo de Konstru-Forumo. Mi admonas, ke la reguloj de ĝenerala lingva sistemo apartenas ankaŭ al speciala lingvo, nia faka lingvo. Estas necese studi ĝin kaj apliki senerare.

En la numeroj 18-a kaj 19-a mi menciis la **prepozicion po**, neĝuste aplikitan en la kontribuo de D-ro Zlatko Hinšt. Decembre mi ricevis de li 13-paĝan traktadon titolitan „Komentoj kun elektitaj fragmentoj el retejoj kaj aliaj fontoj pri prepozicio «po»“, en kiu li komence citas la ĝustan signifon de la prepozicio **po** laŭ respektindaj aŭtoroj, sed la esencan pliparton D-ro Z. Hinšt dediĉas al argumentado pere de referencoj al multaj malĝustaj fontoj. Tia argumentado estas vana, la referencoj estas senvaloraj, la tempo uzita por la serĉado estas perdita. Mirige estas, ke la prepozicion erare uzas eĉ funkcie famaj personoj, ekzemple D-ro Werner Bormann. En la traktaĵo estas liaj pluraj misaj aplikoj de **po**, mi elektas nur du: **mia aŭto kaŭzas kostojn inter 54,3 pfenigoj po kilometro; Meze estas 60 pfenigoj po kilometro** (en la teksto titolita „La merkato de trafikservoj“, ĉerpita el la studmaterialo por kurso okazinta dum la 11-a Sanmarina Universitata Semajno en aŭgusto kaj septembro 1992 – AIS-Teksto n-ro 101).

En la ricevita teksto estas ankaŭ tiu ĉi admono (citita sen lingvaj korektoj): *En redaktado s-ro Werner substrekis ilin en aperinta teksto uzitajn prepoziciojn po en teksto kiel po. Tiel leganto povas ricevi impreson pri lingve nekompleta aŭtoro kiu pretednas multe esprimi en sia teksto sed eraras en gravaj gramatikaj detaloj. Laŭ korekta konduto kaj respekto al aliaj aŭtoroj, estas necese esti sindetenata kaj doni al aŭtoro ŝancon por prezenti sian tekston sen intevenoj kun signoj de korektado, eĉ en originala formo. Ekzistas ebleco por recenzento, korektanto, redaktoro, malfermi tiam rimarkojn (Rim) kaj esprimi sian kritikon, rekomendon, opinion ktp. S-ro Werner ne faris tion, sed rekte „korektis“ tekston kiel kompetenta profesoro laŭ eraroj de sia(j) lernanto(j).*

S-ro Hinšt ne havas ĝustan scion pri redaktado. En ĉiu serioza redakcio estas praktikata ankaŭ lingva redaktado, ne estas imageble (konscie) publikigi tekston lingve eraran. Malgraŭ tiu redakcia principo, en la 18-a n-ro de KF mi lasis la tekston de la aŭtoro Z. H. sen gramatikaj korektoj (enkonduke mi tie menciis „konservante lian lingvan prezenton inkluzive de nekompleta interpunkcio“), mi atentigis nur pri la plurfoje ripetita eraro koncerne la prepozicion **po**, kiun mi tie grasigis kaj substrekis – jes, instrucele. La kulpigo de mia persono flanke de Z. H. estas do neprava. Lian lastan 13-paĝan kontribuon mi ne publikigas, sed mi sendos ĝin aparte al ĉiuj kunlaborantoj, kiuj povas la traktaĵon komenti aŭ rekte al la aŭtoro aŭ al mi.

El la grupeto de KF-legantoj kontribuis al la temo **Claude Longue-Épée**. Al li ne plaĉas la francmaniera esprimeblo de «po» en la Fundamento, kiun mi en KF 19 prezentis: Li mesaĝis, ke la tradukoj al la franca ŝajnas al li konfuzigaj. Lia opinio la taŭga interpreto estus : „à raison de“ sekvata de numeralo (esprimata aŭ subaŭdata).

Nun mi fermos la bedaŭrindan kaj neatenditan diskuton pri «po» per tri referencoj (A, B, C), unue mi prezentos la vortojn de L. L. Zamenhof:

A. En la Lingva respondo 42 en *La Revuo* el aŭgusto 1908:

La vorto «po» antaŭ iu esprimo de mezuro signifas, ke tiu mezuro rilatas ne al ĉiuj personoj aŭ objektoj **kune**, sed al ĉiu **aparte**; ekzemple: ili ricevis po kvin pomoj = ne ĉiuj kune ricevis 5, sed ĉiu el ili aparte ricevis kvin pomojn; la drapo kosta po 2 spesmiloj por metro = ĉiu metro (ne la tuta drapo) kosta 2 spesmilojn; ili vendas pogranda = ĉiu aparta porcio, kiun ili vendas, estas granda (t.e. ili vendas nur grandajn porciojn). Oni ne povas diri «je 80 centimoj po funto» aŭ «30 mejlojn po horo», sed oni devas diri «po 80 centimoj por (ĉiu) funto», «po 30 mejloj en horo».

En *La Esperantisto*, 1891, p. 7, Zamenhof tuŝis la prepozicion «po» konekse al la kazo en la esprimo: «doni po 2 pecojn» aŭ «doni po du pecoj». Li esprimis sin tiel ĉi: Estas ankoraŭ malfacile diri, kiu estas la pli

bona... Tamen konsiderante, ke danke la intervenon de la vorto «po» la «pecoj» jam ne dependas rekte de la «doni», ni konsilas uzi post «po» (tiel same post «da») la nominativon («doni po du pecoj»). Alia kaŭzo por tiu ĉi konsilo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke laŭ nia opinio ĉie, kie oni dubas inter la nominativo kaj akuzativo, oni devas uzi la nominativon.

B. Rüdiger Eichholz, iama ĉefo de la Terminologia centro de ISAE, en la Slipara Vortaro, slipo n-ro E-18, atentigas, ke koncizan esprimon de frakcistreko en formuloj oni voĉe legu kiel la prepozicion «per». Sekvas ekzemploj: rapideco de 100 km per horo; premo de 3 kilopondoj per kvadratcentimetro; $g = 9,81$ metroj per kvadratsekundo. Fine li admonas: „La uzo de la prepozicio „po“ en ĉi tiuj ekzemploj estus kontraŭfundamenta“.

C. Nian diskuton afable kontribuis la kunaŭtoro de la Nova PIV, Michel Duc Goninaz, kiu sendis al ni tiuteman artikolon, publikigitan en 2007, "Kiel la anĝela PO povas helpi vin por ricevi dolarojn, manĝi pomojn kaj eble ĉesigi la fumadon", La Ondo de Esperanto, n-ro 6, p.10-12. La artikolon mi sendas al ĉiuj forumanoj almete kun tiu ĉi numero de KF. Al la aŭtoro dankon!

Félix García Blázquez: Hidraŭlika-sanitara terminaro

Unue mi prezentas viajn voĉojn. **Bronislav Ĉupin:**

95 nepermeabla. Pli konvenas termino **malpermeabla**. (WE pri la problemo mencias sube.)

156 tralasiva kaj 104 – permeabla estas sinonimoj. Oni povas elekti unu el tiuj. Mi preferas la terminon **permeabla**.

50 freatika. Mi ne scias, kion tiu vorto signifas.

Ĉiujn ceterajn terminojn mi konsideras taŭgaj.

WE: La adjektivo «freatika» estas uzata (miascie) nur ĉe naturaj subsurfacaj akvo kaj tavolo. La signifo: akvo sub la tera surfaco, kiu prezentas lokan liberan kontinuan akvonivelon, ofte aperanta en kvaternaraj rokaĵoj aŭ en surfacaj zonaj efloreskaĵoj. Ĝi ne estas kovrita de netralasiva tavolo kiel ĉe akvo arteza. La akvo estas kutime en negranda profundo, atingebla en neprofundaj putoj.

Rémy Bouchet: Pri la francaj tradukoj, mi havas kelkajn rimarkojn: pri *kruda akvo*, anstataŭ *eau brute* oni ĝenerale parolas pri: *eau naturelle*. – Pri *trinkebla akvo*, anstataŭ *eau buvable* oni parolas pri: *eau potable*. *Trinkebla akvo* estas ĉerpita el subtera akvo-tavolo, kiun oni france nomas: *nappe phreatique* (freatika tavolo). Pri *malpura akvo*, mi apartigas: *uzitaj akvoj*, *poluitaj akvoj* kaj *Eaux-vannes* (fr): mi ne havas precizan tradukon, eble *kloakaj (latrinaj) akvoj*, laŭ la signifoj, kiujn mi aldonas ĉi sube:

Eaux naturelles: (*naturaj akvoj*) Akvoj, kiuj troviĝas rekte en la naturo, kiuj ne estas pritraktitaj de homoj kaj kiuj povas esti trinkeblaj aŭ ne, kun aŭ sen gaso kaj ankaŭ mineralaj aŭ ne.

Eaux potable: (*trinkebla akvo*) Akvo, kiu povas esti trinkata sen danĝero por la sano.

Nappe phréatique: (*freatika tavolo*) Tavolo de subtera akvo, kiu provizas fontojn kaj putojn.

Eaux-vannes: (eble *kloakaj / latrinaj akvoj*) Uzitaj akvoj, devenantaj el fekaĵ-fosaĵoj kaj kloako-basenoj.

Eaux usées: (*uzitaj akvoj*) krom la indiko "industriaj". Akvoj forigitaj post doma uzo (el sanitaraĵoj, kuirejoj).

Eaux polluées: (*poluitaj akvoj*) Akvoj malpurigitaj tiel, ke ili fariĝis akvoj malsanigaj kaj danĝeraj, ekz. akvoj poluitaj per nitratoj.

RIM.: Tiuj difinoj estas ĉerpitaj el du vortaroj: "*Le dictionnaire professionnel du BTP*" (La profesia vortaro pri konstruado) kaj la vortaro "*Le petit Robert*". (Mi esperas, ke miaj tradukoj estas sufiĉe ĝustaj.)

Fabien van Mook komentis la prezentitajn terminojn detale. Lian taksadon mi sekvos en la sekvantaj linioj, en kiuj mi prezentos ankaŭ mian opinion (t.e. de WE):

Fluidomeĥaniko (Marĝena rimarkigo: WE preferas „meĥaniko“ kun la litero ĥ laŭ la greka fonto.)

Blázquez notis, sed ne decidis pri la nomo de akvoj, kiuj troviĝas sur la tera surfaco. Sub la n-ro 4 estas: akvo surfaca, surtera, supraĵa. Pro la ekvivalentoj en, fr, de, es kaj pro la klare difinita dislimo inter la akvoj aperantaj sur-, sub-, kaj super- la tersurfaco mi jam en la Jarkolekto de TAKE 2009 uzis kaj nun proponas: **surfaca akvo**. Pro tiu supozeble akceptota termino estas konsekvence akceptebla la termino **akvo subsurfaca** (ne subtera). Mi resumas la akceptindan parton pri fluidomeĥaniko:

3 – subsurfaca akvo	37 – fluo	104 – permeabla**
4 – surfaca akvo	50 – freatika akvo	145 – spezo
16 – arteza akvo	66 – kanalo*	146 – stacionara***
29 – dukto	95 – nepermeabla**	190 – surfaca tensio

* **kanalo** – polisemia nomo, en PIV ĝin sekvas sume 8 signifoj. El ili la akvorilataj estas: 1 Artefarita akvovojo; 2 Simila artefaritaĵo, uzata por diversaj celoj, sekigo de marĉa regiono, irigacio, forkondukado de

malpuraĵoj ks: kloaka kanalo; 3 Parto de maro, pli larĝa ol markolo... WE: La signifo laŭ PIV 2 estas nia nocio «kanalo», sed pli vaste komprenata ol la specifa kloaka kanalo.

** **permeabla** – jam kodifita adjektivo en la faka esperanta leksiko; Fabien van Mook proponas la radikon «perme» laŭ la angla modelo kaj pretas ĝin uzi en derivaĵoj. Mi (WE) preferas konservi la aktualan formon. B. Ĉupin preferas **malpermeabla**. Mi demandas lin kaj la ceterajn: ĉu vi scias imagi, kion signifas la vorto «malpermeabla»? Estas malfacile tion imagi, simile malfacile estas imagi ekz. la kvaliton «malverda». Ekzistas adjektivoj esprimantaj kvaliton, kiu estas aŭ ne estas, sed ne entenas kvaliton inversan, kiel tion permesas ekzemple la adjektivo «bela»: bela – nebela – malbela. Mi scias imagi, ke io estas permeabla aŭ nepermeabla, la strikte inversan kvaliton ne. Mi preferas konservi la kvaliton «nepermeabla».

*** **stacionara** – internacia faka termino (*stationary, stationär, stationnaire, стационарный, stacionární*), estas nepre bezone sekvi la modelon en la lingvo, kiu estas deklarata kiel internacia. Terminoj senbezzone aŭtonomaj kompromitas nian lingvon en nacilingvaj fakaj medioj.

Akveduktoj kaj drensistemoj (Titolo laŭ Blázquez, liaj proponoj estas plu skribitaj kursive.)

La terminon 2 *akvedukto* ni jam difinis kiel nomon nur de antikvaj akvoduktoj.

La terminon 3 *akvokondukilo* en la senco de akvodukto ni malakceptu kaj dume detale ne traktu.

N-ro 6 *kruda akvo* estas natura akvo neniel purige traktita, laike nomata ankaŭ natura (fr: *eau naturelle, eau brute, eau crue*), en sistemaj terminaroj la nocio ne aperas.

N-ro 9 *enfiltraj akvoj* estas nomindiko de fakuloj neuzata, kvankam bone komprenebla: akvoj origine surfacaj, kiuj enfiltrigis en la teron. La faka termino en pluraj lingvoj – en: *vadose water*, de: *vadoses Wasser*, ru: *вадозная вода*, cs: *vadózni voda*. Mi do lanĉas la neologismon **vadosa akvo**. La difino: Akvo, kiu enpenetris (enfiltrigis) en grundan aŭ rokaĵan medion sub la tera surfaco, aŭ kiu sub la tersurfaco estiĝis en kondensa proceso el akvovaporoj de atmosfera origino.

N-ro 10 *malpuraj akvoj*. Ĉe Blázquez mankas la germana ekvivalento. Mi trovis: *Abwasser, Abfallwasser, Ablaufwasser, Schmutzwasser*. En Esperanto ne ekzistas normigita termino. Tiu de Blázquez estas bone komprenebla, utiligebla estas la franca *eaux polluées* (poluitaj akvoj). En KF ni jam traktis tiujn akvojn kiel «rubakvojn» sen iu via refuto (PIV 4 – rubo = forĵetindaĵoj). Por la nocio ne ekzistas internacia nomo. Mi preferas ĝin pro unusilabeco de la radiko (rub), kiu estas facile prefiksebla (rubakvo). Diskuti ni povas ankaŭ pri la radiko «polu», prefiksebla al «poluakvo».

N-ro 12 *akvoj reziduaj*. Blázquez tie notis kiel germanan ekvivalenton *Abwasser*, sed tiu signifas rubakvo. Mia opinio temas pri grave malpurigita akvo, proksima al ŝlimo (en: *sludge water*). Mi proponas la terminon malakcepti kiel ambiguan kaj neklaratan.

N-ro 14 *uzitaj akvoj*. Verŝajne la aŭtoron influis la franca *eaux usées*, kiun mi trovas en mia ĉefa-franca teĥnika vortaro por la nocio rubakvo: *eau usée, eau résiduaire* (vidu 12). Temas jam pri la tria esprimo por malpura akvo, rubakvo. Mi proponas malakcepti ĝin, sinonimaj terminoj ja estas nedezirataj.

N-ro 67 *ĉefa kloako*. Laŭ mia suba pritrakto de la temo 30 pri kanalizacio, oni povas la terminon konsideri „ĉefa kolekta kanalo“. Se oni traktas kloakan kanalreton, oni povas paroli pri „ĉefa kolekta kloako“.

N-roj 68 kaj 70 (*finflua/forflua kloako; interkapta kloako*) entenas iom svagajn terminojn, kiujn mi nunmomente ne volas analizi kaj serĉi fidindan starpunkton. Provizore ni preterlasu ilin.

N-ro 69 *flanka kloako*. Certe temas pri kolekta kanalo (kloako), kiu ne estas ĉefa.

N-ro 163 *separita sistemo*. Oni povas rezoni, ke la signifo de separi rilatas sole al geedzoj (PIV), ke ne eblas ĝin apliki. Sed legu plu (en PIV): Separ(at)ismo Σ Tendenco postuli kaj atingi apartiĝon de regiono, lando k.s. disde la regno, al kiu ĝi apartenas. La radiko «separ» estas en la ekvivalentoj donitaj de Blázquez, nome en la angla, franca kaj hispana lingvoj. La radiko ja devenas el la latina verbo *separare* (= apartigadi). Iu povas proponi la nomon bazitan sur la radiko «apart» (apartigita sistemo), sed ĝi ne estus internacia, do por la internacia lingvo malpli konvena. Blázquez, uzinte la formon de pasiva participo separita, gramatike eraris. Separita ja ne estas la sistemo, sed la rubakvoj, la sistemo estas **separanta**. La sistemo separas ilin. Estas necese uzi «celan verban adjektivon», kiu havas la formon „separa“. Jen mia noto pri la gramatikaĵo ĉerpita el: *Terminologiaj konsideroj* (J. Werner 2003):

Celaj adjektivoj servas por esprimi celon, al kiu la objekto, ekipaĵo, metodo servas, aŭ por marki funkcion, kiun ili estas plenumantaj. La adjektivoj montras, ke certa objekto estas destinita por iu agado, por certa maniero de uzo: *desegna papero* – papero destinita por desegnado; *rega buteo* – buteo destinita por regiono; *akvuma ekipaĵo* – ekipaĵo destinita por akvumi; *apartigita tavolo* – tavolo destinita por apartigi ktp.

N-ro 164 *unik(ec)a sistemo*. Ankaŭ en tiu termino la atributo ne estas ĝusta. Signifo de la vorto «unika» estas alia (PIV): 1 Sola laŭ sia kvalito; ne havanta alian aŭ similan...; 2 ununura, sol sola. La plej racia solvo: **miksita sistemo**, i.a. laŭ la germana *Mischsystem, Mischwasserkanalisation*.

Via opinio pri la traktitaj terminoj el la *Hidraŭlika-sanitara terminaro* de Blázquez estas dezirata.

Ni solvas termin-vakaĵojn

La temo 15 – spezo aŭ trafluo. Bronislav Ĉupin informas nin (2009-12-23): Mi konsentas kun la terminoj proponitaj de Fabien. La terminon **flukvanto** mi ne plu subtenas. **C. Longue-Épée** ripetas, trafluo = la fenomeno de fluado, spezo = kvanto fluanta tra profilo dum iu tempounuo, debito = netaŭga termino. Li pretas alpreni terminojn kaj difinojn proponotajn de Fabien van Mook.

La temo 30 – kanalizacio. Rémy Bouchet informas: Koncerne la vortojn kanalizacio kaj recipiente mi plene konsentas kun C. Longue-Épée en KF 17 (**WE**: Supozeble vi volis diri „en KF 19“, ĉu? En KF 17 ne estis mencio pri C. Longue-Épée). **Claude Longue-Épée** nove kontribuis: Mi konsentas kun la difinoj de J.W. Ĉiukaze „kloako“ ne estas granda ujo (franceca interpreto), sed kanalo defluiganta kloakaĵojn... „Kloakaĵo“ estas pli ĝenerala ol „sanitara rubakvo“. – „Separi“ rilatas nur al «separo de geedzoj». Komento de **WE**: La konstato pri kloako estas ĝusta. La rilatigo de „kloakaĵo“ kun „sanitara rubakvo“ (en KF 19 menciita de Fabien van Mook) estas problema, ĉar „sanitara rubakvo“ en si prezentas kontraŭdiron: La signifo de „sanitara“ estas: „Koncernanta la publikan sanon“, sed rubakvo nepre ne povas pozitive rilati al publika sano. Rubakvon en neniu kazo kvalifiku la epiteto «sanitara». Fine de ĉi tiu traktaĵo mi detale formulos kelkajn bazajn nociojn, inter ili ankaŭ rubakvojn. – Pri „separi“ mi jam esprimis min en la supra diskuto pri la proponoj de F. G. Blázquez. – **Fabien van Mook** afable komunikis al mi la retadreson de profesoro Witold Stępniewski el la pola Lublin, specialisto pri sanitaro kaj media inĝenierado, al kiu ni konsulte turnos nin post la fermo de nia ĉi tema diskuto.

Nun mi prezentas la difinojn de la bazaj terminoj el la fako „kanalizado“: 1. fremdaj akvoj, 2. kanalizacio, 3. rubakvoj, 4. kanalizado, 5. kanalreto, 6. kanalo, 7. kloako, kloaka kanalo, 8 recipiente:

- 1. fremdaj akvoj** – pluvakvoj retenataj per bar-fosoj aŭ per alia maniero ekstere de kanalizita teritorio, ili ne estas fluigataj tra kanalreto.
- 2. kanalizacio** – en: *sewerage; wastewater disposal-system*; de: *Abwassertechnik; Stadtentwässerung; Abwasserableitung*; ru: *канализация*; cs: *kanalizace*.
Kanalizacio – kompleto de ekipaĵoj servantaj por sendamaĝa defluigado de rubakvoj kaj por ties purigo ĝis tiu grado, ke estu sekurigita ekonomia kaj higiena valoroj de la naturaj akvofluoj por provizado de la loĝantaro, industrio kaj agrikulturo per akvo, ankaŭ por la celo de homa natura refreŝiĝo. Al kanalizacio viciĝas kanaloj, drenaj retoj, reguligo de lokaj akvofluoj lige kun forkonduko de akvoj el komunumoj, industriaj areoj, aerodromoj, stacioj kaj purigejoj de rubakvoj. Laŭ la karaktero de rubakvo oni distingas kanalizacion **pluvakvan**, **kloakan** kaj **industrian**. Laŭ posedo ekzistas kanalizacio **publika**, kiu defluigas kaj sendamaĝigas rubakvojn el homaj setlejoj kaj fabrikoj, ĝi estas mastrumata de publika organizaĵo. Plu estas kanalizacio **objekta**, kiu defluigas rubakvon el nmoveblaj posedaĵoj kaj entreprenoj. Laŭ alia kriterio estas distingata kanalizacio **interna** (interne de konstruaĵoj) kaj **ekstera** (ekstere de konstruaĵoj). **Sistemo** kanalizacio respektas urbanisman perspektivon de komunumo kaj traktas la plenan amplekson de kanalizata teritorio.
- 3. rubakvo** – en: *sewage; waste water*; de: *Abwasser*; ru: *сточная вода*; cs: *odpadní voda*.
Rubakvo – akvo, kies natura kvalito malboniĝis pro homa agado. Laŭ la origino ĝi povas esti **industria** – poluita en produkta proceso, **pluva** – akvo el atmosferaj precipitaĵoj defluigata per kanalo, **kloaka** – akvo el loĝejoj, socialaj stabloj, objektoj de kolektiva sennutrado kaj tranoktado k.s., **hospitala** – devenanta el sanitara (sanzorgaj) stabloj, **urba** – miksaĵo de kloakaĵoj kaj industriaj rubakvoj defluantaj tra publika kanalizacio, **agrikultura** – speco de rubakvoj el agrokulturaj kaj animalbredaj produktaĵoj, **fridiga** rubakvo k.a. Laŭ kvalito estas distingata rubakvo **freŝa** – en kiu ne okazas anaerobiaj procesoj, **putranta** – en kiu jam komenciĝis anaerobiaj procesoj, **infekta** – enhavanta patogenajn ĝermojn de tia grado, ke ĝi bezonas specialan pritrakton antaŭ ties enlaso en publikan kanalizacion, **radioaktiva** – poluita de radioaktivaj substancoj, **toksa** – enhavanta substancojn tokse efikantajn jam ĉe malgranda koncentriteco. Laŭ aliaj kriterioj estas taksata rubakvo **kruda** – alfluanta en purigejon de rubakvoj, **antaŭpurigita** – kiu antaŭ enlaso en kanalreton aŭ en komunuman purigejon trapasis specialan pritrakton por elimini substancojn, kiuj povus endanĝerigi funkcion de la purigejo aŭ la sanon de ties personaro, event. difekti la materialon de kanaloj kaj objektoj, **diluita** – kies natura konsisto estas maldensigita per pluvaj, drenaj, aŭ subteraj akvoj, **maldensa** – komunuma (urba) rubakvo nemulte ŝarĝita laŭ la «bioĥemia bezono de oksigeno» (BBO₅; *Biochemical Oxygen Demand* – BOD₅) aŭ laŭ valoro de alia polua faktoro, **senpluvaj rubakvoj** estas komunumaj akvoj nediluitaj per pluvakvo.
- 4. kanalizado** – en: *sewerage*; de: *Stadtentwässerung*; ru: *канализация*; cs: *stokování*.
Kanalizado – scienca-teĥnika fako, kiu sin okupas pri la sistema teorio de la fako kaj pri projektado, konstruado kaj ekspluatado de kanal-retoj.

RIM.: **1.** La radiko «kanal» estis elektita pro la bezono trakti ĉiujn specojn de rubakvaj kanaloj, ne nur la kloakajn. La homonimio konekse al la formo kanalo, en PIV difinita laŭ 7 aliaj signifoj, ne portas en si

danĝeron de miskompreno, ĉar ĉiam grave rolas la kunteksto. 2. La derivaĵo kanal/et/ar/o (PIV 2005, p. 522 – reto de kanaletoj aŭ konduktiloj¹ aranĝita sub tero, por la defluigado de la malbonaj akvoj) estas neakceptebla laikaĵo por la nocio kanalreto, vidu 5 kaj 2.

5. **kanalreto** – en: *sewerage network*; de: *Kanalisationsnetz; Entwässerungsnetz; Kanalnetz*; ru: *канализационная сеть*; cs: *stoková síť*.

Kanalreto – parto de kanalizacio (kun la koncernaj objektoj) defluiganta rubakvojn el certa teritorio. Depende de la speco de rubakvo ĝi estas **pluvakva, kloaka** k.s. (komparu kun 2). Laŭ la maniero de kondukado de rubakvoj el setleja teritorio, kanalreto povas esti sisteme **separa** – kiam ĝi defluigas unuopajn specojn aŭ grupojn de rubakvoj aparte, sisteme **unueca** – kiam ĝi defluigas ilin kune, aŭ **semisepara** – kiu prezentas kombinaĵon de la menciitaj du sistemoj (ekz. rubakvoj el tegmentoj kaj senpolvaj veturejoj estas defluigataj tra pluvakva reto kaj la ceteraj tra komuna reto). Laŭ la aranĝo de unuopaj kanaloj al la funkcia komplekso, depende de la konfiguracio (morfologio) de tereno kaj la maniero de prikonstruo de la teritorio, principe oni distingas sistemon **radialan** – unuopaj kanaloj radie konverĝas al unu punkto, **branĉitan** – unuopaj kanaloj iras grade laŭ la plej kurta direkto al kanaloj de pli alta rango kaj fine ĝis la purigejo aŭ recipiente, **kroĉitan** – kanalo, kroĉita al paralela linio de valo, rivero, iras laŭlonge de recipiente (kutime en longa valo), grade akceptas akvojn el unuopaj kolektaj kanaloj, kiuj estas kurtaj kaj ofte al ĝi orientitaj orte, **zonan** – la kanalreto estas dividita al kelkaj altitudaj zonoj, en kiuj kanaloj povas esti aranĝitaj diversmaniere.

6. **kanalo** – en: *sewer*; de: *Kanal*; ru: *водосток; канал*; cs: *stoka*.

Kanalo – tubaro, galeria dukto aŭ malfermita akvofoso, principe dukto por defluigado de rubakvoj el parto de senakvigata teritorio per gravita maniero. Laŭ materialo kanaloj estas **betonaj, ŝtalbetonaj, ŝtonceramikaj** (*stoneware; Steinzeug*)², **brikaj, fibrocementaj, plastaj** k.a. Laŭ la formo de traflua kverprofilo estas kanaloj **cirkklaj, ovoformaj, faŭkaj, platarkaj** (larĝa-alta proporcio estas pli granda ol tiukategoria norma profilo), **altarkaj** (larĝa-alta proporcio estas malpli granda), **malfermitaj** – en la formo de nekovrita fluejo kun netralasiva surfaco. Laŭ interna libera profilo estas kanaloj **netrapaseblaj kaj traireblaj**. Laŭ la maniero de konstruado estas kanaloj **tubaj** – kunmetitaj el tubaj prefabrikoj, **monolitaj** – betonitaj surloke, rekte en la foso, **duonprefabritaj** – kun la fundo el betono farita surloke kaj kovritaj per prefabritaj elementoj (kovrilo), **masonitaj** – konstruitaj surloke el brika masonaĵo, **ŝildboritaj** – metitaj en la spacon kreitan per enpremado de speciala ŝildo, **tunelitaj** – metitaj en la galerion konstruitan per tunel-metodoj. Laŭ la funkcio estas kanaloj **malŝarĝigaj** – kondukantaj pluvakvojn el malŝarĝiga akvujo en recipienton, **alkondukaj** – parto de trunka kanalo inter la lasta malŝarĝiga akvujo kaj purigejo de rubakvoj, **trunkaj** – irantaj en purigejon de rubakvoj aŭ recipienton, **industriaj** – ili defluigas la industriajn rubakvojn ekde la fonto rekte en purigejon. Laŭ vicigo en la kanalretan sistemon estas distingataj kanaloj **strataj** – ili estas kanaloj de la plej malalta rango, faŭkitaj en kolektilojn, **kolektaj** (kolektiloj) – kanaloj de diversa (pli alta) rango, kiuj defluigas akvon el la strataj kanaloj, event. ankaŭ el aliaj kolektaj kanaloj, **kroĉitaj** kanaloj kaj la **ĉefaj kolektaj** kanaloj funkcias en la kroĉa sistemo. Laŭ branĉiteco de kanalreto oni distingas kanalojn **kolektajn flankajn** (inkl. de la partaj) kaj **ĉefajn**.

7. **kloako, kloaka kanalo** – kanalo kiel parto de kloaka kanalreto, destinita por defluigi kloakan rubakvon, t.e. akvon uzitan en loĝaj kaj publikaj konstruoj, ekz. socialaj establaĵoj, lernejoj, kulturaj kaj ekonomiaj unuoj servantaj por sinnutrado, tranoktado, komerco, sporto, kulturo, klerigado k.s.

8. **recipiento** (en akvomastromado) – en: *receiving water; receiving body of water; recipient*; de: *Vorfluter*; fr: *réipient*; ru: *водоприемник*; cs: *recipient*.

Recipiento – akvaro, en kiun estas ellasataj rubakvoj; recipiente kutime estas rivero aŭ vasta akvotenejo, kiuj en certa riverbaseno efikas kiel natura defluiga elemento (rivero, burno, artefarita bardiga aŭ natura lago, tralasiva tertavolo, maro). RIM.: Recipiento en la traktata senco ne estas ĝenerala kolektujo de rubakvoj, nek kloako tiel difinita en pluraj vortaroj, kiuj ĝin konsideras kiel de akvo netrapasebla kloakujo, fekaĵujo (ekz. J. C. Wells: kloako = *cesspool*), nek de rubakvoj trapasebla **septiko** (en: *septic tank*; de: *Septik-Tank*; ru: *септик, септик-тенк*; cs: *septik*) – necesa nova termino, ankoraŭ de mi en esperantaj fontoj ne trovita.

En la 8 punktoj mi provis nove difini la plej bazajn nociojn el la fako „kanalizado“. Malgraŭ tio, ke vi ne estas specialistoj pri kanalizado, mi petas vin, **prijuĝu la ok bazajn terminojn kaj ties difinojn** kaj informu min pri via starpunkto. La dekojn de grase tajpitaj adjektivaj atributoj, kiuj laŭ pluraj kriterioj

¹ konduktilo ne ebligas defluigi akvon; konduktilo – esti trapasebla per iu formo de energio.

² la nocio en Esperanto ne havas nomon, en PIV 2005 notita «grejso» estas sabloŝtono kaj logike ne povas funkcii kiel homonimo por tie nedifinita „tre dura ceramikaĵo“, kiel mencias PIV.

klasifikas la bazajn nociojn, vi povas komenti nur laŭ via bonvolo, tiun klasifikadon mi intencas trakti en la plua etapo, kiam ni la bazan nociaron interkonsentos, ankaŭ post ĝia pritrakto kun la pola specialisto, esperantisto, kiun proponis Fabien: Prof. Witold Stępniewski el la pola Lublin. La adjektivoj, kiuj staras antaŭ la baza termino, estas flankelementoj servantaj por karakterizo de la ĉefelemento simile kiel en kunmetitaj vortoj. Ili sekvas klasifikajn kriteriojn. Al tiu afero ni venos en iu sekvonta numero de Konstru-Forumo. Fine, en la tria etapo, ni povus provi ellabori koncizan (nekompletan) sisteman terminaron por kanalizacio.

La temo 31 – Bazaj terminoj en konstrufaka varmteĥniko. Bronislav Ĉupin informas: Post tralego de la artikolo de Fabien van Mook «Terminoj pri varmo-transiĝo el ISO 7345» mi longe meditis kaj venis al konkludo konsenti kun la opinio de Jan Werner. Ĉi tie temas ne pri pasivaj proprecoj de materialoj, sed pri ilia aktiva rolo: ties povo, kapablo. Do mi subtenas la terminojn **varmokonduktivito** kaj **varmorezistivo**. Nome la sufikso **-iv-** signifas “pova”, “kapabla”.

Rémy Bouchet: Mi preferas la formojn varmokonduktivito kaj varmorezistivo, ne varmokondukteco kaj varmorezistiveco. Mi konsentas kun tio, kion skribis WE en KoFo 17.

Claude Longue-Épée: Mi konsideras „konduktivito“ pli preciza ol „kondukteco“.

Teksto pri la fako konsultota kun fizikista skipo. Pri la teksto mi eklaboris en decembro 2009, sed ĝis hodiaŭ ne finis pro miaj aliaj gravaj farenadoj. La tasko daŭras kaj mi taksas ĝin grava. Provizore mi petas pardonon flanke de vi kaj precipe de la fizika fakulo Fabien.

La nova temo 32 – Taluso. Leganto de nia KF, d-ro Heinz Hoffmann, sekretario de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF, sendis al ni interesan kontribuon por la rubriko „Ni solvas termin-vakaĵojn“. Jen ĝi: La problemo TALUSO.

En la nuna PIV la trafikfaka termino **taluso** ekzistas por du nocioj:

1. Deklivo donita al fosaĵo, tranĉeo aŭ terplenigaĵo.
2. Artefarita altaĵo el tero aŭ rokpecoj, sur kiu pasas vojo aŭ fervojo tra valo aŭ tra malalta loko.

Miaopinie tute ne estas tolereble, havi komunan terminon por du tre diversaj nocioj – ĉi tie por dudimensia supraĵo kaj tridimensia ŝutaĵo – en la sama fako, eĉ sama faka detalo. Mi vidas jenajn du solvojn:

1. Doni por la nocio **taluso 1** la terminon **talusdeklivo** kun jena vortigo por PIV:

taluso (TRAFIKO-vinjeto) Artefarita altaĵo el tero aŭ rokpecoj, sur kiu pasas trafikvojo tra nesufiĉe ebena aŭ firma tereno;

~**deklivo.** Deklivo donita al taluso, digo, fosaĵo, tranĉeo aŭ terplenigaĵo. – Viŝi ĉion de la verbo **talusi**.

2. Uzi por la nocio **taluso 2** la terminon **digo** kun jena vortigo por PIV:

digo 1 Artefarita altaĵo, starigita por ŝirmi lokon kontraŭ inundo de rivero aŭ maro, aŭ por trafikvojo tra nesufiĉe ebena aŭ firma tereno.

digo 2 Transversa muro, konstruita en riveroj, por provizore haltigi, aŭ malakceli la fluon, aŭ reguligi la nivelon.

~**i** (tr) Bari akvon per digo.

taluso (sen vinjeto) **1** Deklivo donita al digo, fosaĵo, tranĉeo aŭ terplenigaĵo.

2 (evi) = digo 1.

~**i** (tr) Doni al ŝakto, vojo, digo, fosaĵo, tranĉeo aŭ terplenigaĵo certan oblikvan klinon rilate la horizontalon.

Kvankam la unua solvo estas pli simpla, la dua solvo respondas al pluraj naciaj lingvoj, kie la radikoj **talus** – aŭ simile, koncernas deklivon, nenie ŝutaĵon (laŭ 19-lingva terminaro de Internacia Fervojunio):

lingvo	deklivo	ŝutaĵo
franca	<i>talus</i>	<i>remblai</i>
hispana	<i>talud</i>	<i>terrapléna</i>
nederlanda	<i>talud</i>	<i>ophoging</i>
portugala	<i>talude</i>	<i>aterro; terraplenu</i>
rumana	<i>talus</i>	<i>rambleu</i>

La temon mi (WE) prezentas al nia kolektiva prikonsidero kaj laŭebla helpo en la decido. Same kiel la kolego Hoffmann, ankaŭ mi vidas la ambiguecon de «taluso» netolerebla. Konatiĝinte kun la alternativoj de H. Hoffmann, mi elektas kaj rekomendas la unuan. Mi vere ne rekomendas vastigi la kontraŭakvan signifon de «digo» al kiu ajn terŝutaĵo en tereno. Plu mi montros la solvon de A. Broise, kiu estis franco kaj prezentis la francan terminon TALUS kiel dusignifan, do ankaŭ por la korpo de teraĵo (*talus de remblai*).

Inĝeniero A. Broise, iama ĉefo de Terminologia Centro de ISAE, estas aŭtoro de „Teknika terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj“ (en la Jarlibro de UEA 1959). El la terminaro mi citas:

Taluso – en: *embankment*; fr: *talus de remblai*; de: *Auftrag*; vojtaluso, talusmuro; talussupraĵo = taluto.

Taluto (supraĵo de taluso) – en: (*face of*) *slope*; fr: *talus (surface)*; de: *Böschung, Damm-Böschung, Böschungsfäche*; taluto (de kavovojo), taluta talusmuro.

Krom la alfabetaj vortaretoj, en la verko estas ankaŭ ilustraĵoj kaj praktika teksto, en kiu la aŭtoro aplikis ĉiujn terminojn. Mi scias ankaŭ, ke la neologismon «taluto» mencias Andeé Cherpillod en „Nepivaj vortoj“ (1988) kun la noto, ke tiu vorto aperis en *Esperanto-serbokroata vortaro* (1958) kompilita de M. Givoje.

Mia starpunkto rilate al TALUTO estas: Laŭ sia formo ĝi estas tre simila al TALUSO, nocie ambaŭ estas strikte parencaj, en realo ĉiam aperantaj kune, (taluso ne povas ekzisti sen taluto), pro tio malfacile memoreblaj, ofte oni devus streĉi pensadon por konsciiĝi, kiu termino prezentas kiun nocion. La neologismon mi ne rekomendas, kvankam vi povas mem libere formuli vian opinion. Oni povas konjekti, ke la formo taluto originas en la naciaj modeloj kun la fina „d“: *talud, talude*.

Antaŭ ol akcepti mian imagon pri la afero, mi rekomendas analizi ankoraŭ la taluson kiel terŝutaĵon. En la ĉeĥa lingvo ekzistas du profesiaj vidpunktoj, kiujn estas utile reflekti ankaŭ en Esperanto:

násyp (teraĵo) – el tero (substanco) surŝute farita korpo super la nivelo de origina tereno, unu el specoj de teraj konstruktoj. Teraĵo kiel projektita konstrukto ne ĉiam estas bazo de digo, ĝi povas esti ankaŭ area konstrukto, ekzemple ĉe konstruo de sportejoj, deponejoj, aerodromoj, parkejoj k.s. Germane: *Anschüttung; Aufschüttung, Auftrag*. Itale: *riempimento*; (por digo) *diga terrapieno*; (el lomo) *interramento*.

násep (taluso) – plene finkonstruita teraĵo kun finale aranĝitaj deklivoj kaj platformo por fervoja aŭ ŝosea konstruaĵo. Laŭ G. Waringhien (1957) «taluso» havas du signifojn: *talus* kaj *remblai*. Laŭ J. C. Wells (1969) estas taluso sinonima al digo (= *embankment*), kaj *slope* unualoke al deklivo, dualoke al taluso.

Mi ĵus uzis la nomon „deklivo“. Mia opinio ĝi estas bone uzebla kaj por naturaj deklivoj kaj por la artefaritaj dekliv(aĵ)oj ĉe talusoj aŭ ĉe naturaj terenoj geometrie modifitaj laŭ projekto (surface artefaritaj). Deklivo en la germana: *Hang, Abhang, Böschung*; en la angla: *slope, sloping; scarp*. La neologismo «taluto» ne estas bezonata. En PIV 2005 estas «deklivaĵo» sekvata de referenco ankaŭ al taluso.

Postskribo al la 20-a KF-letero

La 20-a numero de KF iom vastiĝis pro gravaj terminologiaj problemoj, dum la 123-jara evoluo de Esperanto ankoraŭ nesolvitaj (mirige por mi!). Klare difinitaj terminoj mankas ĉie ĉirkaŭ ni kaj esperantistoj ne emas serioze – terminologie – la situacion disvolvadi direkte al la nivelo de kulturaj lingvoj. Male, por amuza amatorado estas esperantistoj ĉiam pretaj. Nun (2010-01-22) mi ricevis kaj legas inviton al tradukado de interreta EUROVOC, oficiala multlingva tezaŭro fare de EU, kiu enhavas 6645 kapvortojn por ebligi konversacion pri EU-rilataj temoj (sed ne nur tiaj). Inicijatintoj de la tradukado asertas, ke la movado havas multajn fakajn terminarojn kaj vortarojn, ke la traduko estas facila, bezonata estas nur kunordiganto. Bone, oni traduku, sed sciante pri la ĝenerale malalta kvalito de niaj fakaj vortaroj kaj pri ĝenerala ignorado de terminologiaj principoj normigitaj far ISO, mi prave timas pri kvalito de la traduko.

Estus utile, se nia modesta, sed pozitiva kontribuo sur la kampo de konstrufako kaj fakoj parencaj, estus sekvata ankaŭ de aliaj profesiuloj. Tio estas eĉ pli urĝa ol la tradukado de la interreta EUROVOC.

Mi petas vin, ke vi trastudu ĉi lastan KF kaj bonvolu esprimi vin minimume pri la jenaj punktoj:

1. Bonvolu informi min, kiu segmento de konstrufako, arĥitekturo kaj koneksaj fakoj kaj metioj apartenas al via profesieco (praktiko).
2. Kiun el la studmaterialoj vi posedas: a) Plena Analiza Gramatiko de Eo (PAG), b) Plena Ilustrita Vortaro (PIV), c) Terminologia gvidilo (H. Suonuuti 1998), d) Terminologia kurso (J. Werner 1986).
3. Ĉu vi kontribuos al la Jarlibro de TAKE 2010?
4. Ĉu vi akceptas / malakceptas la nun traktitajn konkludojn pri la terminaro de Blázquez? Kiuj estas viaj distingaj rimarkigoj al unuopaj terminoj?
5. Ĉu vi konsentas pri la nun prezentita analiza pritrakto de la 8 bazaj terminoj el la fako kanalizado? Kiuj estas viaj rimarkigoj al unuopaj terminoj?
6. Se vi ankoraŭ ne prezentis vian opinion pri la termino varmokonsukteco / varmokonduktivito, bonvolu la aferon pripensi kaj informi min pri via starpunkto.
7. Kiu estas via opinio koncerne la novan temon 32 – taluso?

Bonvolu reagi al J. Werner (<...@...> aŭ <...@...>) **antaŭ la fino de februaro 2010**. Samtempe min informu, ĉu vi volas plu funkcii kiel „forumano“, t.s. ke vi estas pli-malpli regula kontribuanto de profesiaj juĝoj pri la temoj en KF prezentitaj, aŭ, ĉu vi deziras, ke mi konsideru vin nur kiel „leganton“ de KF, kiu ankaŭ rajtas levi sian voĉon al la traktataj temoj, se iu vin ekinteresas. La vidpunkto de identiĝo kun nia forumo estas grava por la decidoj pri akcepto aŭ malakcepto de lanĉitaj kaj traktataj termin-proponoj. Por komuna akcepto estas bezonata plena interkonsento aŭ event. sindeteno.

Brno la 24-an de januaro 2010-01-24

Jan Werner